

Enhavo

1	Aranĝoj pasintaj	3
1.1	13-a Konferenco de GIL 2003.....	3
1.2	Pri lingvoj de Eŭropa Unio en Japanio (<i>USUI Hiroyuki</i>)	4
1.3	Konferenco en Olomouc (CZ) pri la rolo de la angla (<i>Petro Chrdle</i>).....	4
1.4	Interlingvistika simpozio en Amsterdamo (<i>Wim Jansen</i>)	5
1.5	Monda kongreso de Linguapax pri lingvodiverseco en Barcelono (<i>Renato Corsetti</i>)	6
2	Aranĝoj estontaj.....	7
2.1	Pri kibernetiko kaj interlingvistiko en Paderborn	7
2.2	14-a konferenco de GIL.....	8
3	Novaj eldonaĵoj	8
3.1	Interlingvistikaj eldonaĵoj el Litovio.	8
3.2	Pri naturaj kaj artefaritaj lingvoj.....	9
3.3	Interlingvistiko kaj esperantologio: Enkonduka verko pri materialfontoj de Detlev Blanke.....	9
3.4	De CED: “Esperanto, Interlinguistics, and Planned Language”(<i>Humphrey Tonkin</i>).....	11
3.5	Latino sine flexione – 100jara (<i>Věra Barandovská-Frank</i>)	12
3.6	“Esperanto sen mitoj” (<i>Marcus Sikosek</i>)	12
3.7	Esearo de Jan Werner pri terminologio de Esperanto	12
3.8	Ilustrita frazeologio de Sabine Fiedler.....	13
4	Eŭropa Lingvo-politiko	14
4.1	Pri la germana-finna lingvo-konflikto en la jaro 1999.....	14
4.2	“Europäische Einheit in babylonischer Vielfalt” (<i>Andreas Ross</i>).....	14
4.3	„Ĉu nur-angla Eŭropo?“ (<i>Robert Phillipson</i>)	14
4.4	Ĉu la lingva estonteco de Eŭropo sekvas planon? Kolokvo en Amsterdamo.....	14
5	Revuoj	15
5.1	„Journal of Universal Language“	18
5.2	“Japana Esperantologio” N-ro 2	18
6	Universitatoj.....	19

6.1	Kvara sesio de Interlingvistikaj Studoj en Poznań	19
6.2	Amsterdamaj studentoj en Pekino	20
6.3	Alternejaj disertaĵoj	20
6.4	Kunlaboru en universitatj kursoj (<i>Josef Vojáček</i>).....	20
7	Lingvistikaj terminoj en Esperanto	21
7.1	Etvortaro pri Lingvo kaj Komunikado (<i>Ilona Koutny</i>)	21
7.2	Verkota? Esperantlingva Lingvosciencia Vortaro (<i>Cyril Brosch</i>)	22
8	Bibliografioj.....	23
8.1	GDREA-Biblioteko	23
8.2	Virtuala brokantejo	23
9	La interlingvisto Hartmut Trautmüller.....	24



IpI informas pri interlingvistikaj aktivecoj kaj publicaĵoj, inkluzive lingvo-politikaj. La redaktoro nur mencias materialojn, kiujn li ricevis kiel originalon aŭ kopion. La bulteno estas bibliografie orientita, tamen ankaŭ publikigas recenzojn, raportojn kaj aliajn materialojn. Dezirindas vasta internacia kunlaboro.

1 Aranĝoj pasintaj

1.1 13-a Konferenco de GIL 2003

La 13-a konferenco de (germana) Gesellschaft für Interlinguistik e.V. [GIL] (Societo pri Interlingvistiko) okazis de 28.-30.11.03 en Berlin. Partoprenis 36 personoj, inter ili 29 membroj de GIL.

La jara membro-kunveno elektis jenan estraron de GIL:

Prezidanto: *Dr. sc. Detlev Blanke (Berlin)* dblanke.gil@snafu.de
Vicprezidantinto: *Dr. habil. Sabine Fiedler (Leipzig)* sfiedler@rz.uni-leipzig.de
Trezoristo: *Dipl.-Ing. Horst Jasmann (Berlin)*
Membroj: *Dr. Werner Bormann (Hamburg)* w-bormann@t-online.de
Dr. habil. Cornelia Mannewitz
cornelia.mannewitz@philfak.uni-rostock.de

Kadre de la faka programo (ĉefa temo: “Lingvo-inventado - lingvo-planado - planlingvoj”) oni prezentis jenajn prelegojn (krom tiu de Wennergren ĉiuj en la germana lingvo):

Bertil Wennergren: „Esperanto en la Interreto“

Andreas Emmerich: „Tradukproblemoj ĉe la ekzemplo de la romano ‚La Mastro de la Ringoj’ de Tolkien“

Dr. Věra Barandovská-Frank: „Ĉu planlingvoj apartenas al lingvo-planado?“

Prof. Dr. habil. Martin Haase: „Lingvo-planado en Eŭskio“

Dr. habil. Sabine Fiedler: „Lingvo-planado kaj lingvaj ludoj“

Dr. habil. Rudolf Fischer: „Lingvoŝanĝo en Esperanto ĉe la ekzemplo de la sufikso –i-,“

Dr. habil. Cornelia Mannewitz: „Kio estas la germana lingvo por difinita societo ? Rigardo de ekstere al la ‘Societo Germana Lingvo’,“

Dimanĉe vespere okazis renkontiĝo kun la brazila verkisto *Zé do Rock*, kiu vivas en Munkeno. Li prezentis siajn nekutimajn librojn, kiuj plenas de lingvo-ludoj (i.a.: „Deutsch gutt sonst Geld zuruck“. München: Kunstmann, 2002, 256 p., ISBN 3-88897-297-3).

1.2 Pri lingvoj de Eŭropa Unio en Japanio

La 4-an de oktobro 2003, en la kadro de la 12-a konferenco de Japana Societo pri Socilingvaj Sciencoj, okazinta en la Universitato de Osaka (Suita), *USUI Hiroyuki* prezentis referaĵon pri Esperanto titolitan: “De pontolingvo al grupiga lingvo: kiel ŝanĝiĝas la situigo de Esperanto pro la Eŭropa unuiĝo”. La referaĵo koncize skizis kiel raŭmismaj ideoj naskiĝis kaj evoluis ĝis la fondo de “Esperanta Civito” kaj konkludis ke la provo de “Civito”, kvankam pri ĝia sukceso oni ne povas esti certa, almenaŭ respegulas la socikulturan etoson en Eŭropo, kie transnaciigo alportas relativigon de teritorieco en la konceptado de lingvo kaj etno, ebligante por iuj esperantistoj pensi pri Esperanto kiel grupiga lingvo kaj pri ĝia komunumo kiel kvazaŭ-etna grupo. Post la prezentado sekvis sesio de demandoj kaj respondoj, en kiuj unu ĉeestanto komentis, ke la kultura pretendo de raŭmismaj esperantistoj rememorigas tiun de surduloj pri la ekzisto de ilia propra kulturo surbaze de signolingvo, kaj de aliaj leviĝis demandoj pri ebleco de disdialektiĝo de Esperanto aŭ pri (ne)ekzisto de iamaj provoj starigi Esperantan ŝtaton (de la tipo de “Amikejo”).

(USUI Hiroyuki: usui_hiroyuki@hotmail.com)

1.3 Konferenco en Olomouc (CZ) pri la rolo de la angla

La Universitato Palacký en Olomouc (Ĉeĥio) organizis internacian konferencon (23.-25.4.2004) sub la duseca titolo "English is not enough" (La angla ne sufiĉas - Da angla ne estas sufiĉe). La konferenco celis prezenti la anglan kiel "lingua franca" de Eŭropo. Tiu termino estas uzata en lingvistiko por naciaj lingvoj, kiuj en certa multlingva teritorio servas kiel komunaj internaciaj komunikiloj, kvankam oni devas akcepti, ke tiu "lingua franca" [pron.: lingua franka] havas alian nivelon ol la literatura aŭ eĉ ĉiutaga lingvo de denaskuloj de la koncerna lingvo.

La konferencon partoprenis pluraj invititaj pintaj lingvistoj kaj pedagogoj de eksterlando (Aŭstrio, Belgio, Britio, Hungario, Slovakio), kiuj faris la ĉefprelegojn dum la plenkunsidoj kaj gvidis la paneldiskuton.

Inter proks. 100 ceteraj aliĝintoj estis ankaŭ aliaj eksterlandanoj, ekz. el Usono kaj Pollando, sed plejparte ĉeĥaj instruistoj de la angla. La ĉefa celo de la konferenco estis krom la interŝanĝo de spertoj inter pedagogoj ankaŭ instigi ĉeĥajn instruistojn de la angla pli efike instrui la lingvon. Sed ne mankis ankaŭ prelegoj emfazantaj la lingvan buntan de Eŭropo kaj pledantaj por la instruo ankaŭ de la ceteraj lingvoj krom la angla (en Ĉeĥio precipe la germana).

Dum la konferenco okazis granda ekspozicio de la eldonejo Oxford press, en kiu mi trovis krom multaj lernolibroj kaj aliaj helpiloj por instrui kaj lerni la anglan

ankaŭ la verkon de R. Phillipson pri angla lingva imperiismo¹ (eldonita ok jarojn antaŭ lia verko "English-Only Europe?", konata inter esperantistoj).

Aktive partoprenis ankaŭ 3 esperantistoj, bedaŭrinde neniu el ili dum la plenkunsido. Ĉar la traktoj okazis en 7 paralelaj sekcioj, la publiko do malabundis:

La usona instruisto de la hispana kaj eksprezidanto de ILEI *Duncan Charters* prezentis trajtojn de lingva edukado en Usono, kie nun altiĝas intereso pri la hispana kaj malkreskas la intereso pri la ceteraj lingvoj. Dum la prelego li kelkfoje (memkompreneble pozitive) menciis Esperanton.

Petro Balaz (SK) prezentigis kiel reprezentanto de SKEJ (Slovakia Esperanto-Junularo) kaj projekciis tre bele faritan filmon pri "Esperanto – lingva incognita", post kiu sekvis - malgraŭ malmultaj ĉeestantoj – sufiĉe vigla kaj interesa diskuto.

Petro Chrdle (CZ) en sia kontribuo prezentis precipe la propedeŭtikan valoron de Esperanto por sekva lernado de etnaj lingvoj, inkluzive la anglan.

Dum la panela diskuto estis afiŝitaj ĉiuj demandoj, kiujn la partoprenantoj dum la konferenco metis en difinitan skatolon. Sekve ili estis diskutataj sub taktbastono de la ĉefprelegantoj sidantaj frunte de la publiko, sed bedaŭrinde oni trasaltis tiujn por ni plej interesajn, kiel ekzemple:

- Se estas bezonata "lingua franca", kial ne ekuzi Esperanton? aŭ
- Kial la denaskaj parolantoj de la angla ne lernas uzadi la anglan kiel "lingua franca"? Tiukaze ja ili pli efike povus komuniki kun nedenaskaj parolantoj.

Informis: Petro Chrdle (chrdle@kava-pech.cz)

1.4 Interlingvistika simpozio en Amsterdamo

Danke al subvencioj de Internacia Esperanto-Instituto (IEI) kaj Esperanto Studies Foundation (ESF) la Amsterdama katedro pri interlingvistiko kaj Esperanto okazigis sian duan interlingvistikan simpozion (16.12.04). Ĉi tiaj konferencoj kunvenigas profesiulojn, sed estas malfermaj al ĉiu intereso. Ĉi-jare aliĝis 70 personoj. La aranĝo estis dediĉita ĉefe al aspektoj de natureco de la nederlanda, la jida kompare kun la nov-hebrea kaj de Esperanto. La prelegoj, en la sidejo de la Instituto Meertens de la Akademio de Sciencoj, estis jenaj:

- Dimensies en paradoxen (Dimensioj kaj paradoksoj), *Prof. Dr. Pieter Muysken (Katholieke Universiteit van Nijmegen)*
- Geplogenheden en gekunsteldheden: taalverzet in het Nederlands (Kutimoj kaj artefaritaĵoj: Lingvo-rezisto en la nederlanda), *Prof. Dr. Roeland van Hout (Katholieke Universiteit van Nijmegen)*

¹ Phillipson, Robert (1992): Linguistic Imperialism. Oxford: Oxford University Press, 365 p.

- Van dode tot levende taal en vice versa: Hebreeuws en Jiddisch in de 19e en 20e eeuw (De morta al vivanta lingvo kaj inverse: La hebrea kaj jida en la 19-a kaj 20-a jarcentoj) *Dr. Shlomo Berger (Universiteit van Amsterdam)*
- Het Tulip projekt: een 17e eeuwse kunsttaal op internet (La tulipa projekto: artefarita lingvo el la 17-a jarcento en la interreto) *Dr. Jaap Maat (Universiteit van Amsterdam)*
- De ontkenning in het Esperanto: kunst of kitsch? (La negado en Esperanto: ĉu natura uzo korektas artefaritecon?) *Doc. Dipl. Phil. Wim Jansen (Universiteit van Amsterdam)*

Oni antaŭvidas la publikigon de la prelegoj.

Estas planate okazigi la trian, iom jubilean simpozion je la Zamenhofa Tago en 2004 (15.12) kaj prioritare trakti Esperantan temon.

Raportis: Wim Jansen <Jansenwimh@cs.com>

1.5 Monda kongreso de Linguapax pri lingvodiverseco en Barcelono

De la 20-a ĝis la 23-a de majo 2004 en Barcelono okazis la 10-a Kongreso de Linguapax kun la ĉeftemo "Dialogo pri Lingva Diverseco, Daŭripova Evoluo kaj Paco", organizita de la Instituto Linguapax lige kun la Universala Forumo de Kulturoj Barcelono 2004. La Instituto Linguapax, kun sidejo en Barcelono, estas la heredinto de la samnoma agado de Unesko.

La kongreson partoprenis monde konataj lingvistoj, kiel *David Crystal, Bernard Comrie, Suzanne Romaine, Fernand de Varennes, Miquel Siguan kaj Joshua Fishman*.

Krom la prezentoj en la pleno la laboroj okazis en kvin paralelaj seminarioj pri "Pozitivaj modeloj de lingvopolitiko kaj lingvoplanado", "Studkazoj pri lingvorevigligo kaj normigo", "Pritakso de la nuna socilingvistika esplorado", "Lingvojuro kaj lingvorajtoj", "Rolantoj favoraj al lingvodiverseco.

Universala Esperanto-Asocio estis reprezentita de *Abel Montagut* kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) de *Radojica Petrović*. La prezento de *Abel Montagut* en unu el la seminarioj estis tre pozitiva, laŭ la juĝo de la prezentinto kaj de la prezidanto de la koncerna seminario, *Lachman Khubchandani*. Preskaŭ la sola objekto flanke de la partoprenintoj estis, ke Esperanto ne havas subtenon de ŝtato(j) kaj tial ĝi ne povas disvastiĝi.

Radojica Petrović prezentis tri E-projektojn de E@I, ILEI kaj Hesselbom Berlin GMBH, kiuj subtenas lingvan diversecon per praktikaj rimedoj kaj efektiva

agado: “Lingva Prismo”, “Lernu!” kaj “Interkulturo”, kiujn finance helpas la usona fondaĵo Esperantic Studies Foundation (ESF) kaj kelkaj neesperantistaj fondaĵoj. Notindan atenton de la publiko altiris la principoj de interlingvismo, kiujn interpretas kaj favoras la “Lingva Prismo” kaj kiujn la aliaj du projektoj praktike aplikas. Kelkaj aŭskultintoj interesiĝis pri uzeblo de la teknikoj kaj spertoj de Lernu! por lernado de aliaj diasporaj lingvoj, aŭ petis kunlaboron por aplikado de la metodoj de Interkulturo.

La tekstoj de la prelegoj de *Montagut* kaj *Petrović*, originale faritaj respektive en la kataluna kaj angla, estos baldaŭ je dispono ankaŭ en Esperanto kaj aliaj lingvoj.

François Grin, profesoro pri ekonomiko en la Universitato de Ĝenevo, prelegis per prezento utiliga el ekonomika vidpunkto pri la multlingveco kaj kontraŭ la hegemonio de unu sola etnolingvo. Li asertis interalie, ke ankaŭ la ĝenerala publiko komprenos la gravecon de la multlingveco kaj de la rolo de neŭtrala interlingvo nur, se multaj fakuloj, diversnivele, ilin priinformos.

Entute ricevis informojn pri la rolo de Esperanto favore al lingva diverseco pli ol 50 fakuloj, studentoj aŭ interesitoj. Ankaŭ *François Grin* plurfoje menciis la pozitivan rolon de la internacia lingvo. Dimanĉon vespere, la 23-an de majo 2004, estis intervjuitaj du katalunaj socilingvistoj, *Miquel Siguan* kaj *Jesus Tuson*, kadre de la Foruma aranĝo titolita "141 demandoj". Lige kun la temo "Se ĉiuj parolus la anglan, ĉu oni interkompreniĝus pli bone?", ili ambaŭ menciis Esperanton.

(Laŭ Renato Corsetti)

2 Aranĝoj estontaj

2.1 Pri kibernetiko kaj interlingvistiko en Paderborn

La eldonantoj de la revuo „Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft/Humankybernetik (GrKG)“ kaj la Instituto por Kibernetiko Berlin & Paderborn okaze de la 40-jariĝo de ilia ekzisto okazigos sciencan kolokvon. Ĝi okazos 26. - 28. 8. 2004 ĉe la kulturscienca fakultato de la Universitato de Paderborn kaj havas la kadran temon „Klerigo – lingvoj – kibernetiko“. La gvidanto de la aranĝo, *Prof. Dr. Volker Peckhaus*, katedro por filozofio, akceptas aliĝojn kaj prelego-proponojn. Adreso: Universität Paderborn, Warburger Straße 100, 33098 Paderborn; apeck1@hrz.upb.de; Telefono: 05251-602411, Fakso: 05251-603744.)

La kolokvo verŝajne realiĝos en tri sekcioj:

1. Instruobjektivigo per novaj komunikiloj kiel apliko de la klerigo-kibernetiko
(Gvidas: *Prof. Dr. Günter Lobin.*)
2. Universalaj lingvoj, semiotiko, lingvo-kibernetiko
(Gvidas: *Prof. Dr. Volker Peckhaus.*)
3. Interlingvistiko – Eŭrolingvistiko – eŭropaj lingvo-problemoj
(Gvidas: *Dr. Věra Barandovská-Frank*)

Pri kostoj kaj kondiĉoj turnu vin al la supre menciita adreso aŭ al *Dr. Věra Barandovská-Frank* vera.barandovska@zitmail.upb.de).

2.2 14-a konferenco de GIL

La 14-a konferenco de (germana) Gesellschaft für Interlinguistik e.V. [GIL] (Societo pri Interlingvistiko) okazos de 5.-7.11.04 en Berlin. La konferenca lingvo estos la germana.

Kadra temo: “*Internaciaj planlingvoj – evoluo kaj komparo*”

Interesiĝantoj sin turnu al la redaktoro de ĉi-tiu bulteno.

3 Novaj eldonaĵoj

3.1 Interlingvistikaj eldonaĵoj el Litovio

Lastatempe aperis tuta serio da interlingvistikaj verkoj en Litovio, kie oni evidente komprenas la strategian signifon de interlingvistiko.

Gudavičius, Aloyzas (2002): Interlingvistikos įvadas. (Enkonduko en interlingvistiko). Šiauliai: Universitetas, 102 p.

Eco, Umberto (2001): Tobulos kalbos paieškos Europos kultūroje. (La serĉo de la perfekta lingvo en la eŭropa kulturo, El la itala trad. Inga Tuliševskaitė). Vilnius: Baltos lankos, 343 p.

Lamberti, Vitaliano (2002): Vienas balsas visam pasaului. Leizeris Zamenhofas, Esperanto kūrėjas. (Unu voĉo por la Mondo. L. Zamenhof - kreinto de Esperanto. El la itala trad. Gudaitis Algimantas kaj Inga Tuliševskaitė). Vilnius: Alma littera, 448 p.

Duličenko, Aleksandr (2004): Pasaulinės kalbos beiėškant, arba interlingvistika visiems. (En la serĉado de la universala lingvo, aŭ interlingvistiko por ĉiuj. (El la rusa trad. Ramutė Justina Kiburytė). Vilnius: Mokslo ir enciklopedijų leidybos instituta, 159 p.

3.2 Pri naturaj kaj artefaritaj lingvoj

La sekva artikolaro entenas la prelegojn de konferenco el la jaro 2002 (kp. IpI 44/ p. 4), okazigita de la katedro pri aplikata lingvistiko ĉe la Budapeŝta Universitato "ELTE".

Gecső, Tamás (2003, Red.): Természetes nyelvek - mesterséges nyelvek (Naturaj lingvoj – artefaritaj lingvoj). Budapest: Tinta 2003, 101p., ISBN 963 9372 70 6

Jen la artikoloj (kun esperantigitaj titoloj) :

Endre Dudich: Spertoj de plurlingva tradukisto (26-32)

Gecső Tamás: De la naturaj lingvoj al la artefaritaj lingvoj (41-46)

Ottó Haszpra: Scienca kaj faka aplikado de Esperanto (historia skizo, 47-54)

Oszkár Princz: Pri gravaj stadioj de la vivantiĝo de Esperanto (t. e. Kiel ĝi iĝis lingvo vivanta, 68-79)

Palma Császár-Salomonné: Mia patra lingvo estas Esperanto (78-86).

Zsuzsa Varga-Haszonits: Naturaj elementoj en lingvoj artefaritaj (87-93)

Krome:

Péter Ács: Pri lingvorenovigo en Norvegio (7-12)

Viktória Bányai: De la hebrea lingvo klasika ĝis la ivrita lingvo (13-17)

Zsuzsa Vladár-Constantinovitsné: La lingvo latina en la Eŭropa kulturo (18-25)

Géza Füssi Nagy: Lingvorenogivo en Nigra Afriko (33-40)

Éva Zsilinszky: La hungara lingvo-renovigo (94-101).

3.3 Interlingvistiko kaj esperantologio:

Enkonduka verko pri materialfontoj de Detlev Blanke

La sekva verko ne estas simpla bibliografio sed celas helpi trovi la materialfontojn por interlingvistikaj kaj esperantologiaj publikaĵoj:

Blanke, Detlev (2003): Interlingvistiko kaj esperantologio: Vojoj al la faka literaturo. (Esperanto-Dokumentoj 39E), Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 40 p.

Enhavo:

- 0 Antaŭrimarko
- 1 Interlingvistiko, planlingvoj, esperantologio
- 2 Monografioj, antologioj kaj konferencaktoj
- 3 Universitataj disertacioj kaj lernolibroj
- 4 Periodaĵoj pri interlingvistiko kaj esperantologio

- 4.1. Interlingvistikaj periodaĵoj
- 4.2. Esperantologiaj periodaĵoj
- 5 Bibliografioj
- 5.1 Interlingvistikaj superrigardaj bibliografioj
- 5.2 Specialaj interlingvistikaj bibliografioj
- 5.3 Internaciaj periodaj lingvistikaj bibliografioj
- 5.3.1 BL-CIP
- 5.3.2 BLL
- 5.3.3 MLA
- 5.3.4 LLBA
- 5.3.5 BL-CIP, BLL kaj MLA en komparo
- 5.4 Naciaj periodaj bibliografioj
- 5.5 Bibliografioj pri unuopaj lingvistikaj kampoj
- 5.6 Bibliografie orientitaj interlingvistikaj bultenoj
- 5.7 Bibliografiaj helpiloj por traserĉo de revuoj
- 5.7.1 Lingvistikaj revuoj
- 5.7.2 Esperanto-revuoj
- 5.8 Planlingvaj libro-katalogoj
- 6 Planlingvaj bibliotekoj kaj arkivoj
- 7 Interlingvistiko en elektronikaj medioj
- 8 Registro-verkoj de interlingvistoj kaj esperantologoj
- 9 Literaturo

Resumo

Interlingvistiko kaj esperantologio – vojoj al la faka literaturo

Ne malmultaj publikaĵoj pri interlingvistiko kaj esperantologio povus esti pli altkvalitaj, se iliaj aŭtoroj havintus pli profundan konon de grava fakliteraturo.

Tamen, eĉ por fakulo ofte malfacilas orientiĝi kaj pri la aktualaj kaj pri pli malnovaj sciencaj studoj traktantaj diversajn aspektojn de planlingvoj ([„artefaritaj“]mondaj [help]lingvoj). La studaĵo volas plifaciligi la aliron al fakliteraturo per atentigo pri la multspecaj materialfontoj, kiujn indas eluzi. Krom monografioj tio aparte koncernas malpli konatajn antologiojn, festlibrojn, konferencaktojn, universitatajn disertaciojn, krome iom novajn kaj malpli novajn planlingvajn periodaĵojn.

Por la aktuala informiĝo aparte gravas ĝeneralaj kaj specialaj interlingvistikaj bibliografioj, bibliografie orientitaj bultenoj kaj periode aperantaj internaciaj bibliografioj kun interlingvistikaj sekcioj. Plej rezultodona estas la bibliografio pri modernaj lingvoj kaj literaturoj, eldonata de Modern Language Association (MLA) en Novjorko, kiu ĉiujare registras la plej novajn materialojn.

Specialaj bibliotekoj, pli kaj pli elektronike konsulteblaj, disponigas grandajn esploreblajn materialkvantojn. Por la alirebligo de la faka literaturo la Interreto ludas kreskantan rolon.

De la supra studo aperis jenaj tradukoj:

Angla:

“Interlinguistics and Esperanto studies - Paths to the scholarly literature” en : LPLP 28(2003)2, p. 155-192 (trad. Humphrey Tonkin)

Germana:

„Interlinguistik und Esperantologie: Wege zur Fachliteratur“. Esperanto-Dokumente 7. Bamberg: Deutsches Esperanto-Institut, 2003, 58 p.

Ĉeĥa:

“Interlingvistika. Cesty k odborné literatuře”. (Připojena kapitola Situacie v České republice, Miroslav Malovec [kun aldona ĉapitro pri interlingvistiko en Ĉeĥio de Miroslav Malovec, kiu ankaŭ tradukis la verkon). Dobřichovice: KAVA-PECH, 2004, 69 p.,

Ĉina:

Guojiyuxue he shijieyuxue: tongxiang zhuan ye wenxian zhi lu. Interlinguistics and Esperanto studies: Path to the scholarly literature. Translation from Esperanto and additional chapter on interlinguistics in China by LIU Haitao. Interlinguistische Informationen. 13. Jahrgang/ Vol. 13, Sonderheft/ special edition. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e.V./ Society on Interlinguistics, 2004, 49 p.

3.4 De CED: “Esperanto, Interlinguistics and Planned Language”

La Centro por Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED) en la Eldonejo University Press of America Lanham - New York - Oxford) sub la seria redaktoro *Humphrey Tonkin* ĝis nun eldonis jenajn 5 librojn:

1. Language in Religion (Red. *Humphrey Tonkin/ Allison Armstrong Keef*, 1989), 121 p.
2. Language as Barrier an Bridge (Red. *Kurt E. Müller*, 1992), 124 p.
3. Aspects of Internationalism. Language & Culture (Red. *Ian R. Richmond*, 1992), 151 p.
4. Language Status in the Post-Cold-War Era (Red. *Kurt E. Müller*, 1996), 152 p.
5. Esperanto, Interlinguistics, and Planned Language (Red. *Humphrey Tonkin*, 1997), 232 p.

Ni reproduktas la enhavtabelon de la 5-a volumo :

3.5 Latino sine flexione – 100jara

Barandovská-Frank, Věra (2003): De Latino sine flexione centenario. Ein Jahrhundert Latino sine flexione. En: Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft/ Humankybernetik (grkg), Vol. 44, Beiheft, Berlin-Paderborn: Institut für Kybernetik, 100 p.

3.6 „Esperanto sen mitoj“

Sikosek, Marcus Ziko (2003): Esperanto sen mitoj (dua prilaborita eldono). Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 367 p.

3.7 Esearo de Jan Werner pri terminologio de Esperanto

Werner, Jan (2004): Terminologiaj konsideroj. Dobřichovice: KAVA-PECH, 179 p.

Enhavo:

A. Ĝenerale pri faka apliko de Esperanto kaj pri terminologio

1. Kulturo de komunikado
2. Ĉu konflikto inter vorto kaj nocio?
3. Perspektivo de planlingvo en scienco kaj teĥniko
4. Apliko de Esperanto en la faka agado
5. Takse pri scienco, lingvo kaj terminologio
6. En Bad Saarow pri la scienca-teĥnika apliko de Esperanto
7. Terminologiaj instigoj el Bad Saarow
8. Nuntempaj tendencoj en la maniero de nomumado
9. Danĝero de pragmata sperto en terminologio de planlingvo

B. Terminologiaj principoj

10. Kompilante terminaron ni procedu kolektive
11. Faklingvaj principoj de vorta elekto kaj formigo
12. Stabiligo kaj normigo de terminaro
13. Antinomio de termina hejmeco kaj internacieco
14. Distingi kvalitojn en rilato de nocio kaj nomo
15. La klasifiko de nocioj
16. Difinoj en rilato al organizo kaj aranĝo de terminara vortaro

C. Leksikaj observoj kaj instigoj

17. Nocio akompanata per nom-problemo

18. El la antaŭparolo al Matematika vortaro
19. Ĉu vere oblongo estas nekvadrata ortogramo?
20. Pri matematika termino grafo
21. Pri stuko kaj stukista metio
22. Terminologia analizo de la vortoj plafono kaj planko
23. Terminiga procedo en Esperanto. Pri la nocio truso
24. Pri la terminoj streĝo kaj streĝigado en la terminaro de IFEF
25. Kio estas tegmenta lukarno?
26. Terminologia sistemigo kaj klasifiko de flekse streĉataj konstruelementoj
27. Pri balko kaj trovoj de Bernard Golden
28. Meditado pri konzolo kaj kantilevro
29. Kompletigu vian vortaron per laminato
30. Buldozo - ekzemplo de nekonvena nomo
31. Medite pri terlaboraj maŝinoj
32. Ni revenu al rekta kurento
33. Pri panel-diskuto

D. Prilingvaj konsideroj

34. Pseŭdoelementoj en Esperanto
35. Kunmetitaj vortoj estas elastsencaj
36. Pri la verba aspekto
37. Pri verbaj adjektivoj celaj kaj agaj
38. Diferencigo inter adjektivoj rilataj kaj kvalitaj

E. Esperanta terminaro de terminologia fako

Enkonduko

Terminaro

1. Lingvo kaj realo
2. Nocio
3. Klasifiko - rilatoj kaj nocio-sistemoj
4. Difinoj
5. Nomindikoj, formo de terminoj
6. Kreado kaj taksado de terminoj
7. Terminologia laboro
8. Terminologiaj produktoj
9. Terminologiaj datenoj

Uzita literaturo

Esperanta indekso

3.8 Ilustrita frazeologio de Sabine Fiedler

Fiedler, Sabine / Rak, Pavel (2004): Ilustrita frazeologio. (Antaŭparolo de Detlev Blanke) Dobřichovice: KAVA-PECH, 135 p.

4 Eŭropa lingvo-politiko

4.1 Pri la germana – finna lingvo-konflikto en la jaro 1999

Kelletat, Andreas F. (2001): Deutschland: Finnland 6:0. Deutschland contra Englisch und Französisch. Zum Dolmetschstreit in der Europäischen Union. Saksa-Suomi: 6-0. (DST, Deutsche Studien Tampere, 4). Saksa vastaan englanti ja ranska. Tulkkauskiistasta Euroopan unionissa. (Übers. ins Finnische v. Maiju Virtanen). Tampere: Universität Tampere, 183 p. (en la germana kaj la finna)

Sekvas la enhavtabelo nur de la germana parto:

4.2 „Europäische Einheit in babylonischer Vielfalt“ (Andreas Ross)

Ross, Andreas (2003): Europäische Einheit in babylonischer Vielfalt. Die Reform des Sprachenregimes der Europäischen Union im Spannungsfeld von Demokratie und Effizienz. Frankfurt/M. et al.: Peter Lang, 158 p.

4.3 „Ĉu nur-angla Eŭropo?“ (Robert Phillipson)

La angla verko de Robert Phillipson (English-only Europe?, vidu IpI 45, p. 12) ĵus aperis en Esperanto :

Phillipson, Robert (2004): Ĉu nur-angla Eŭropo? Defio al lingva politiko (Trad. István Ertl). Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 254 p.

4.4 Ĉu la lingva estonteco de Eŭropo sekvas planon? Kolokvo en Amsterdam

Jansen, Wim (2003, Red.): De talige toekomst van Europa – volgens een plan? [Ĉu la lingva estonteco de Eŭropo sekvas planon?] Amsterdam: Universiteit van Amsterdam, Instituut voor Algemene Taalwetenschap, 61 p. (Aktoj de samnoma kolokvo de 7.12.2002)

5 Revuoj

5.1 “Journal of Universal Language”

Aperis nova lingvistika revuo. Ĝin eldonas instituto de la Sejong-Universitato en Seoul/ Suda Koreujo. Ĝis nun la revuo (ĉiu kajero cx. 180 p.) aperis iom neregule kaj laŭ ne tute klara ritmo. Angle verkantaj interlingvistoj sendu siajn kontribuojn. La ĝis nun aperintaj kontribuoj, se traktintaj pri planlingvoj (= universalaj lingvoj), supozigas grandan nescion pri la jam ekzistantaj rezultoj sur tiu ĉi tereno kaj la faka literaturo. La revuo aperas bedaŭrinde nur en la angla kaj ne nur traktas pri interlingvistikaj temoj, kiel montras la suba redakcia teksto:

“The Journal of Universal Language opens to contributions from a broad range of research approaches: artificial language, universality in language, communication & culture in language, endangered language, and typology. The editors encourage the submission of papers on proposed themes as well as on other topics relevant to the interest of the Journal of Universal Language”

Apartan akcenton la revuo donas al la planlingva projekto *Unish*.

Jen la enhavo de la kajeroj, kiuj aperis ĝis nun:

Volume 1, Number 1 May 1996 (Ne aperis pliaj numeroj dum la jaro):

Myung-Gun Choo: The Need for a Universal Language and Methods of its Creation as Suggested by Hangul

Jared Diamond: Sejong’s Achievement, as Viewed by an American Admirer

Andrew Large: The Prospects for an International Language

Young-Hee Chung: An International Language for the World to Come

Number 2, March 2001. (Ne aperis pliaj numeroj dum la jaro):

Myung-Gun Choo: The Need for “Unish”, an Universal Language, and the Principle of its Development

Seong-Do Kim: The Landscape of Languages at the Commencement of the 21st Century

Young-Hee Chung: Borrowing for a Universal Language

Key-Sun Choi: Artificial Intelligence and Artificial language: Agents in Information Architecture for Intelligent Distributed Multilingual Document Retrieval Service

Chong-Yeong Lee. An Agenda for Action toward a New International Language Order

Stuart Read: Like WTO, Why not WCO ?

Soon-Bok Kim: Toward the Third Millennium: One WWL (World Wide Language) via WCO (World Communication Organization)

Volume 3, Number 1 March 2002 (167 S.)

Stuart Davis: Syllable Structure for an Artificial Language Based on Universal Principles

Frank Esterhill: Interlanguage and 20th Century Scientific Communication

Roland Hausser: Overcoming Language Barriers by Means of Computers

Gerd Jendraschek: The Struggle Against Monolingualism

Andrew Large: The New Babel: Language Barriers on the World Wide Web

Alan Libert & Christo Moskovsky: On the Form and Function of Reflexives in Artificial Languages

Nick Nicholas: Folk Functionalism in Planned Language: The Long-distance Reflexive vo's in Lojban

Volume 3, Number 2 September 2002 (177 S.)

Benjamin Hebblethwaite: The Universality of Morpho-Syntax: Synthetic Compounding in French, English, Dutch and Korean

Yan Huang: Typology of Coreferential Possessive Anaphora and Neo-Gricean Pragmatics: Implications for a Newly Designed Artificial Language

Dong-Young Lee: A Comparison of Unish Grammar with Esperanto

Valery Solovyev: Universals for the New Structural Level of Clause Representation

Jae Jung Song: Language Universals and Universal Language: The Case of the Accessibility Hierarchy in Relativization

Zhonghua Xiao & Anthony McEnery: Situation Aspect as Universal Aspect: Implications for Artificial Languages

Volume 4, Number 1, March 2003 (141 S.)

Purev Jaimai & Hyun Seok Park: Representing Unish Grammars Based on Tree Adjoining Grammar Formalisms

Eun-Joo Kwak: Comparisons between Pidgins and ‘Unish’

David Odden: Languages and Universals

Neils Olsen: Marketing an International Auxiliary Language: Challenges to a New Artificial Language

Miho Sasaki: The Writing System of an Artificial Language: For Efficient Orthographic Processing

Andrey Yakovlev: Evolution of the Pattern of Pronouns and Pronominal Adverbs in Artificial Language

Volume 4, Number 2, September 2003 (182 S.)

Carmen Díez-Carrera & Carlos González-Ruiz: Voice Recognition Systems Toward a Universal Language

Gerd Jendraschek: When Old Paradigms Die, New Paradigms are Born: On the Eternal Cycle of Morphological Change and its Importance for Language Typology

Alan Libert & Christo Moskovsky: A Survey of Relative Pronouns and their Uses in Natural and Artificial Languages

Ashuboda Marasinghe, Stephen Lambacher, William Martens, Michael Cohen, Charith Giragama, Susantha Herath, & Garry Moholt: Universal Perceptual Attributes for Perception of American English Vowels by English and Japanese Native Speakers and Implications for Language Typology

Pawel Rutkowski: On the Universal Neuropsychological Basis of the Syntax of Numerals

Interesatoj sin turnu al:

Sejong University, Institute for Universal Language, Kwangjin-ku, Seoul, Korea 143-747. www.sejong.ac.kr , www.unish.org .

Innentitel

5.2 “Japana Esperantologio” N-ro 2

La unua eldono de “Japana Esperantologio” aperis en 1992 (Vidu IpI 2-3/1992, p. 4).

La espero pri regula periodaĵo de japanaj esperantologoj ĝis nun ne plenumiĝis.

Nur en 2003 aperis dua kajero. Ĉu denove pasos jardeko, ĝis kiam aperos la tria?

Japana Esperantologio. Bulteno de Japana Esperanto-Instituto, N-ro 2, 2003, 70 p.

Jen la enhavo de la komplete japanlingva kajero:

MASHIKO Hidenori: Kôkyôiku ni okeru esuperanto risyuûto gengoken (Lingvaj rajtoj kaj instruado de Esperanto en publikaj lernejoj)

YAMAMOTO Mayumi / USUI Hiroyuki: Arayuru kyôkai wo koete otagai ni manabiau, esuperanto no sisôto sono zissen (Reciproke konatiĝi kaj superi ĉiujn barilojn. La signifo de Esperanto kaj ĝia praktika utiligo)

KIMURA Goro Christoph / USUI Hiroyuki: Eigo no "tikyuûka" to daigaiteki na gengoteki kôkyôken no kanôsei (La “globaliĝo” de la angla kaj ebloj de alternativaj lingvaj solvoj)

WATANABE Katuyosi:

*Bjalistoko ni okeru esuperanto (Recenzo pri “Historio de Esperanto-movado en Bjalistoko”, Varsovio 1999 [de Zofia Banet-Fornalova])

*Zamenhohu ke no hitobito (Recenzo pri “La familio Zamenhof”, La Chaux-

de- Fonds, 2000 [de Zofia Banet-Fornalova])

*Antoni Grabowski – kessyutu sita esuperanto katudôka (Recenzo pri “Antoni Grabowski – eminenta Esperanto-aganto”, Varsovio 2001 [de Zofia Banet-Fornalova])

La kajero estas ricevebla ĉe Japana Esperanto-Instituto:
<http://www2s.biglobe.ne.jp> .

6 Universitatoj

6.1 Kvara sesio de Interlingvistikaj Studoj en Poznań

La kvara sesio de *Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz* (Poznań, Pollando) okazis inter la 01-06.02.2004. *Doc. Michel Duc Goninaz* gvidis la partoprenantojn tra la problemoj de gramatiko (de vortfarado ĝis lingva normo) kaj esperanta leksikografio.

La gestudentoj akiris pli vastajn konojn pri la historio de esperanto-movado dank' al *Aleksander Korĵenkov* (Rusio). *D-ino Ilona Koutny* traktis temojn de aplikata lingvistiko (de lingvopolitiko ĝis komputila analizo de la lingvo) kaj de pragmatiko, al kiu kontribuis ankaŭ *d-ro Zbigniew Galor*.

La tradicia semajneza renkontiĝo (post la sukcesa ekzameno pri interlingvistiko kun *d-ino Věra Barandovská-Frank*) altiris ankaŭ la reprezentantojn de la vigliĝanta junulara movado el Poznań. Ne mankis kantoj, gitarludo kaj humora versio de la scienca programo.

UAM lanĉos denove la 3-jaran interlingvistikan programon en septembro.

Interesiĝantoj bv. anonciĝi:

Dr. Ilona Koutny, membro de AdE
gvidanto de Interlingvistikaj Studoj
Universitato Adam Mickiewicz
Miedzochodzka 5, PL-60-371 Poznań
T: +48-61 829-27-09, sekretariejo: 829-27-01
F: +48-61 829-27-00 (sekretariejo)
<http://main.amu.edu.pl/~interl/index.html>

6.2 Amsterdamaj studentoj al Pekino

Ĉi-somere, la universitato de Amsterdamo, Nederlando, sendos du studentojn pri lingvistiko al la Universala Kongreso en Pekino por la plenumo de surloka esplortasko rilate la intonacian fenomenon en Esperanto. La studenta duopo venkis konkurson, kies premio estas la staĝovojaĝo al la UK. La Amsterdama universitato jam antaŭ unu jaro agnoskis la Universalajn Kongresojn kiel formalan staĝejon. Per sia esplorraporto la studentoj akiros kreditpoentojn konforme al la normalaj universitataj reguloj.

Wim Jansen (Jansenwimh@cs.com)

6.3 Altlernejaj disertaĵoj

Ĉe Universitato Budapeŝt oni defendis jenajn diplomlaboraĵojn:

Berényi, Csilla (2003): Esperanto en interreto. Diplomverko. ELTE BTK Katedro de Ĝenerala kaj Aplikata Lingvistiko, Esperanto-fako, Budapeŝt. 53 p. + 13 suplementoj

Szucsné Tóth, Mária (2003): Literatura legolibro I. (De Zamenhof ĝis la eldonejo Stafeto). Diplomverko. ELTE BTK Katedro de Ĝenerala kaj Aplikata Lingvistiko, Esperanto-fako, Budapeŝt, 51 p.

Bakalaŭra disertacio ĉe la Universitato Wolverhampton/Britio:

Cirio, Elisabetta (2001): Transnational Identity and the Esperanto Community. BA Hons in Deaf Studies and Sociology and Special Needs, University of Wolverhampton, 37 p. (<http://lisetta02.supereva.it/index.htm> (27.01.03))

Doktoriga disertacio en la Universitato Tampere/Finnlando :

Vuorikoski, Anna-Riitta (2004): A Voice of its Citizens or a Modern Tower of Babel? The Quality of Interpreting as a Function of Political Rhetoric in the European Parliament. Academic Dissertation. University of Tampere (The School of Languages and Translation Studies) Acta Universitatis Tamperensis 985. 281 p. (Acta Electronica Universitatis Tamperensis 317. <http://acta.uta.fi/english/kokoteksti.phtml>)

6.4 Kunlaboru en universitataj kursoj – propono de J. Vojáček

Ne sufiĉas nur kursoj por lerni Esperanton. Ilin devas sekvi stud-objektoj instruataj en Esperanto, por ke studentoj havu eblecon tuj uzi la novlernitan

lingvon kaj pliperfektigi en faklingvo. Ekzemple por aŭtuna semestro 2003/4 mi sukcesis envicigi en studprogramon de Pedagogia fakultato de Masaryk universitato en Brno novan stud-objekton: (nedevidan) Klerigkibernetikon, instruatan en Esperanto. Devus ankoraŭ sekvi la tria ŝtupo: internacia kunlaboro inter altlernejoj...Por plifirmigi la pozicion de Esperanto en la fakultato estas bone trovi eblecojn por uzi ĝin en internaciaj esplorprojektoj. En nia fakultato estis establita "Centro de pedagogiaj esploroj" kaj mi proponis al ĝia estro, prof. Maňák, kunlaboron en internaciaj kontaktoj, por kiuj estus uzebla Esperanto. Plua ebleco estas formi kaj aktivigi grupojn de gelernantoj por la projekto Interkulturo. Pasintjare aŭtune okazis en nia fakultato la 11-a konferenco de Asocio de pedagogiaj esploroj, dum kiu mi informis en mia kontribuo pri la projekto kaj ĝenerale pri Esperanto kaj la lingva situacio en EU kun mencio de la Brusela Komunikado Centro. Mi intencas fondi interesrondeton Interkulturo por envicigi infanojn en la projekton Interkulturo kaj mi provis varbi gelernantojn en la fakultata bazlernejo. Mi povas rekomendi ne orientiĝi mallarĝe nur al unu afero, sed laŭ la situacio provi pluajn eblecojn. La listo „Esperanto en universitataj medioj“ (ĝin priservas Germain Pirlot, gepir.apro.@pandora.be - Red.) povas esti bona bazo kaj helpilo por la laboro kaj kontaktoj. Kaj plua ebleco estas senpere registri vian E-kurson en la hejmpaĝo de <http://www.edukado.net/> kie pretiĝis nova informkolekta servo pri la Esperanto-lernejoj

Josef Vojáček (vojacek_j@jumbo.ped.muni.cz)

7 Lingvistikaj terminoj en Esperanto

7.1 Etvortaro pri Lingvo kaj Komunikado (Ilona Koutny)

Ilona Koutny: Angla-Esperanta-Hungara Etvortaro pri Lingvo kaj Komunikado. Kun ekzercoj. Poznań: ProDruk. 126 p. B 6 formato. 9,90 EUR.

La ĉapitro pri "lingvoj kaj lingvistiko" disponigas la bazajn nociojn rilatajn al lingvoj, gramatiko kaj diversaj terenoj de lingvistiko, kiujn oni bezonas, se oni lernas kaj interesiĝas pri lingvoj. La listo de ĉ. 250 lingvoj estas nur elekto el la pli vaste uzataj kaj konataj.

En la dua ĉapitro pri "komunikado praktike" kolektiĝis parolturnoj de la ĉiutaga komunikado, kiu abundas je frazeologiaĵoj kaj tre varias de lando al lando, sed en Esperanto nur malmultaj fiksiĝis. Esperanto funkcias kiel interkultura komparilo inter la du etnaj lingvoj.

La Angla-Esperanta-Hungara laŭtema etvortaro plene trafas vian celon, se vi volas lerni lingvon (ĉefe en progresiva nivelo) kaj ekzameniĝi, aŭ se vi volas paroli kaj skribi pri iu temo kun riĉa vortprovizo. La ĉ. 1200 vortoj kaj esprimoj en la unuopaj temoj estas ordigitaj sub ofte uzataj kapvortoj laŭ

la praktikaj bezonoj de lingvouzo. Ilia speciala lingva bildo de la mondo vokas al plua migrado. Fine, kelkaj leksikaj kaj komunikaj ekzercoj helpas la prilaboron de la temoj.

La unua en la serio de CELTRAFO, laŭtemaj etvortaroj, estas:

Lernado kaj laboro, kiu aperis en 2002 de la sama aŭtorino. Ambaŭ vortaroj mendeblas ĉe UEA, FEL kaj ĉe la aŭtorino.

Dr. Ilona Koutny, membro de AdE, gvidanto de Interlingvistikaj Studoj, Universitato Adam Mickiewicz, Miedzichodzka 5, PL-60-371 Poznań, T: +48-61 829-27-09, sekretario: 829-27-01

7.2 Verkota ? Esperantlingva Lingvosciencia Vortaro (LiVo)

Akceptebla lingvistika vortaro, uzanta Esperanton kiel referencan lingvon aŭ eĉ nur enhavanta la interlingvistikajn kaj esperantologiajn terminojn, ankoraŭ estas farotaĵo.

Tial (inter)lingvistoj, interkonsentinte pri enhavo kaj aranĝo, kune ellaboru tian vortaron (utiligante la interreton), tiel ankaŭ normigante translingve la lingvistikajn terminojn en modela maniero. Tia verko ne estus ignorebla de la establiĝinta lingvoscienco.

Prepara laboro, la kolekto de la terminoj jam ekzistantaj en Esperanto, estas nun farata. Pliaj informo oni trovas ĉe

<http://home.t-online.de/home/Fam.Brosch/livo.html>

Mi ĝis nun kolektis el la literaturo ĉ. 1250 fakvortojn kaj la nomojn de ĉ. 440 lingvoj, kun precizaj fontindikoj kaj, se ekzistis, difino aŭ klariga kunteksto; la listojn mi sendos al la kunlaborantoj.

Jen ekzemplo:

Termino	<u>Priskribo aŭ klarigo k.s.</u>	<u>Germane</u>	<u>Fonto</u>
priskriba lingvoscienco			PIV 1013 +
priskribo	Rekta priskribo klarigas la ĉefvorton de frazparto, kaj estas mem parto de tiu frazparto. Tradicia gramatiko uzas la vortojn "epiteto" kaj "suplemento". Perverba priskribo estas memstara frazparto, kiu priskribas la subjekton aŭ la objekton pere de verbo. Tradicie nomata " <i>predikativo</i> ".	<i>Epitheton, Prädi-kativum</i>	PMEG
privativo	[kazo]	<i>Privativ</i>	PAG 62
produkt-ema/iva		<i>produktiv</i>	LKK 35
prokli-tiko	vorto/partikulo dependa de la sekva akcentata vorto kaj prononcata kune kun ĝi kiel fonetika unuaĵo	<i>Proklitikon</i>	EVE 195 +
prokliz-aĵo	morfemo, kunfandiĝanta kun la posta vorto (=proklitiko)	<i>Proklitikon</i>	PIV 924 +

Lingvoj (germane)	Esperanto
Ndebele	matabela (LKK 65)
Nepali	nepala (PIV 781)
Neugriechisch	novgreka (PIV 408)
Ngbandi	ingbanda (LKL)
Niederdeutsch	malaltgermana (PIV 391), basgermana (PIV 391)
Niederländisch	nederlanda (PIV 778)
Niger-Kongo	niger-konga (LKK 57)

Cyril Brosch, studento de hindeŭropa lingvoscienco kaj orientalistiko (Univ. Würzburg) Cyril.Brosch@stud-mail.uni-wuerzburg.de.

8 Bibliografioj

8.1 GDREA-Biblioteko

La iama Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR (GDREA) disponis pri biblioteko kun ĉ. 2100 volumoj kaj granda nombro da gazetkolektoj.

La tutan bibliotekon transprenis la Fondaĵo Arkivo de Partioj kaj Amasorganizaĵoj de GDR en la Federacia Arkivo (Stiftung der Parteien und Massenorganisationen der DDR beim Bundesarchiv, SAPMO) Berlin. Tiel la valora kolekto estas savita. Aperis jena katalogo:

Lemke, Thorsten/ Ludewig, Monika (2004): Bibliothek des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR. Alphabetischer Katalog der Monographien. Berlin: Arbeitsgruppe zur Erforschung der Geschichte des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR, 200 p.

La katalogo ankaŭ troviĝas sur kompaktdisko. Mendebla ĉe UEA.

8.2 Virtuala brokantejo

Mi vidis hazarde anoncon de Zentrales Verzeichnis Antiquarischer Bücher (Centra registro de brokantaj libroj, www.zvab.com). La serĉvorto 'Esperanto' liveras pli ol 400 librojn, ĉiuj kun detalaj bibliografiaj informoj. Ĝi do estas preskaŭ virtuala katalogo de malnovaj Esperanto-libroj.

En la usona www.abebooks.com estas eĉ pli multaj: nun pli ol 500 titoloj. Pri la temaro vd. mian artikolon en la revuo Esperanto, dec. 2002, p. 251; kaj en IpI, 2002, n-ro 42, p. 8-10.

Ulrich Lins

9 La interlingvisto Hartmut Traunmüller

Ekzistas kelkaj lingvistoj kiuj samtempe estas interlingvistoj kaj bedaŭrinde tamen ne ĉiam sufiĉe konataj. Al ili apartenas la aŭstra lingvisto prof. d-ro Hartmut Traunmüller, kiu jam sufiĉe multajn jarojn laboras en la universitato de Stokholmo/Svedio.

Mi petis lin iom prezenti sin kaj sian interlingvistikan agadon.

La red.

...Estis surprizo por mi, ke la "Informilo por Interlingvistoj" daŭre aperas. Mi supozis ke ne, ĉar mi ne trovis aktualan informon pri ĝi en la TTT....

Jen iom da informo pri mia interlingvistika agado:

De tempo al tempo realiĝas kurso pri interlingvistiko en la universitato de Stokholmo. Lastafoje ĝi okazis en aŭtuno 2003 sub la titolo "interlingvistiko kaj konstruitaj lingvoj".

La enhavo de la kurso ne multe diferencis de tiu de antaŭa fojo, kiam mi metis priskribon en la reton sub la adreso <http://www.ling.su.se/staff/hartmut/il.htm> (vidu sube-Red.).

Novaj eroj temis pri la aŭstralia Damin kaj pri "reguligita lingvo" (controlled language). En tiu ĉi studjaro ankaŭ okazas kurso de esperanto ĉe tiu ĉi lingvistika instituto. La funkcion de lingvo-instruisto plenumas Joakim Enwall. Se estas sufiĉe da intereso ankaŭ dum la sekvonta studjaro okazos daŭriga kurso.

Mia scienca agado temas ĉefe pri fonetiko. En tiu fako mi doktoriĝis en 1983. Pri interlingvistiko mi nur okupiĝis flanke kvankam intereso pri tiu fako kaŭzis, ke mi ekstudis lingvistikon.

En 1975, mi verkis studentan eseon kun la titolo: "A universal interlanguage: Some basic considerations" (<http://www.ling.su.se/staff/hartmut/UIL.pdf>). Sur tiu ankaŭ baziĝas la konferenckontribuo "Socia bazo kaj komunika efikeco de interlingvoj" publikigita en "Miscellanea Interlinguistica", red. de I. Szerdahelyi, (1980) Budapeŝt: Tankönyvkiadó. p. 205-215.

Jam en 1984, mi verkis la cxapitron "La fonetiko de la lingvo Esperanto", kiu aperis en 1997 en "Struktura kaj socilingvistika esploro de Esperanto", red. de Ilona Koutny kaj Márta Kovács. Budapeŝt: Steleto & ILEI. p. 27 - 42.

Mia artikolo "Conversational Maxims and Principles of Language Planning" publikiĝis en PERILUS XII (1991), pp. 25-47 (Dept. of linguistics,

Stockholm university). Tiun artikolon mi ankaŭ metis en la reton (<http://www.ling.su.se/staff/hartmut/griceil.htm>), kaj mi povis konstati ke ĝi estas tre ofte vizitata.

La problemon de nesufiĉa malsimileco de la nomoj de malsamaj literoj, kiun esperantistoj bone konas el sia lingvo, mi traktis en 1999 en konferenckontribuo "Distinctive names for speech sounds and letters obtained with hypercoarticulated vowels" Proceedings of the XIVth ICPHS: 1125 - 1128. (<http://www.ling.su.se/staff/hartmut/abc.pdf>)

Ankaŭ povas esti interesa por interlingvistoj "Sound symbolism in deictic words" in Hans Auli and Peter af Trampe (eds.) "Tongues and Texts Unlimited. Studies in Honour of Tore Jansson on the Occasion of his Sixtieth Anniversary", pp. 213 - 234 (Dept. of Classical Languages, Stockholm University, 2000). Mallongigita versio, en kiu esence nur mankas la listoj de diverslingvaj formoj, aperis jam en 1996 en TMH-QPSR 2/1996: 147 - 151. (http://www.ling.su.se/staff/hartmut/sound_symb_96.pdf)

Ĉefe, mi intencas kontribui al interlingvistiko per vortaro de internaciaj vortoj en la plej parolataj lingvoj. En la kompiladon de tiu vortaro mi investis pli aŭ malpli da tempo jam dum multaj jaroj. La projekto estas prezentita en <http://www.ling.su.se/staff/hartmut/intervok.htm> „

....

Hartmut Traunmüller (hartmut@ling.su.se)

El la TTT-ejo de prof. Traunmüller ni prenis informojn pri liaj universitataj interlingvistikaj kursoj (Red.):

„La termino "interlingvistiko" uziĝas por studoj pri malsamaj sed tamen parencaj objektoj:

(a) Kontaktaj fenomenoj inter lingvoj, observeblaj ĉe lernanto de dua lingvo aŭ komparante etnajn lingvojn;

(b) Interretaj lingvoj spontane kreitaj (piĝinaj kaj kreolaj) aŭ plane kreitaj (kiel Esperanto) kaj la uzo de etnaj lingvoj en interreta komunikado;

(c) Lingvoj konstruitaj ĉu por interreta uzo ĉu ne (= planlingvistiko).

[Jespersen (1931) difinis la fakon jene: "Interlinguistics - that branch of the science of language which deals with the structure and basic ideas of all languages with the view to the establishing of a norm for interlanguages, i.e. auxiliary languages destined for oral and written use between people who cannot make themselves understood by means of their mother tongues."]

La kurso pri interlingvistiko, kiu de tempo al tempo okazas ĉe la Stokholma universitato, tuŝas ĉiujn tiujn studobjektojn.

Kvankam la lingvoj plane kreitaj por interlingva uzo troviĝas en ĝia fokuso, ĝi informas pri la fenomeno de lingvokreado ĝenerale. Ĝi celas doni al la studentoj la eblecon ekkoni kaj memstare prijuĝi la avantaĝojn kaj malavantaĝojn de diversaj proponoj.

La kurso postulas elementajn antaŭkonojn pri lingvistiko. Ĝi turnas sin al parolantoj de konstruitaj interlingvoj (ĉefe reprezentitaj de Esperanto) kaj al progresintaj studentoj de lingvistiko.

Jen superrigardo:

Lekcioj (entute 24 lekcihoroj po 45 minutoj)

1. La ĉiuhoma fenomeno de lingvokreado. Lernado de dua lingvo.

La provizora lingvo de lernanto kaj la estiĝo de piĝinaj lingvoj.

Piĝinaj lingvoj kaj aliaj metodoj de komunikado inter malsamlingvanoj.

2. Estiĝo kaj struktura komparo de kreolaj lingvoj, ekz. la Novmelanezia (*Tok Pisin*) en komparo kun aliaj.

Malkreoliĝo. Tipologio de lingvoj. Lingvaj universalaĵoj.

3. Filosofiaj lingvoj klasifikaj, ekz. tiu de John Wilkins (1668), kaj formale logikaj, ekz. tiu de James Cook Brown (1966).

Pasigrafioj, ekz. la semantografio de Charles Bliss.

4. Aposteriore konstruitaj lingvoj kaj ties fontlingvoj. La utilisma principo.

Lingvaj kulturregionoj kaj la internaciaj vortoj.

La kvar ĉefaj kulturregionoj de la mondo: okcidenta, islama, hinda, kaj ĉina.

5. La strukturo de Esperanto. Iom pri la evoluo de la lingvo.

6. Skemismo kaj naturismo. De Esperanto al Ido, Novial kaj Occidental ĝis Interlingua.

7. Funkcibonecaj aspektoj: Reguloj de lingva planado.

La principo de libervola ekzakteco. Konversaciaj maksimumoj.

La diferenco inter homlingva kaj plenpreciza logiko.

8. La sociaj funkcioj de konstruitaj lingvoj (precipe de Esperanto kaj Bliss), ilia disvastigiteco kaj literaturo (precipe tiu de Esperanto).

Konstruitaj lingvoj kaj lingva teknologio.

Kosto kaj utilo de kroma lingvo: Decidoteorio kaj la elekto individua kaj komunuma de lingvo por internacia komunikado.

Ekzercoj

1 - 2. Esperanto: Gramatikaj strukturoj kaj legado kun tradukado.

3. Interlingua: Ĉefe legado kaj tradukado.

4. Gustumado de tekstoj de diversaj konstruitaj lingvoj (Ido, Novial, Mondial, Ling, k.a.) kaj de la sveda ŝerclingvo Transpiranto.

Eldonas: Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED)
ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Redaktas: Detlev Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin, tel.: ++ 49-30-54 12 633,
fakso: ++ 49-30-54 56 742, dblanke.gil@snafu.de. Mendojn oni direktu nur al UEA,
kontribuojn nur al la redaktoro, per retroŝto aŭ sur diskedo. Artikoloj sen indiko
pri aŭtoreco estas de la redaktoro. Represo kun fontindiko permesata. Bv. sendi
pruvekzempleron. Bibliografiatas ĉefe viditaj materialoj. Bv. sendi ilin al la redaktoro.
Pri CED vidu: www.esperantic.org. Materialoj ĉiam bonvenaj. ISSN 1385-2191
